
# KONGRESLIBRO



# 42-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

MALAGA, 16-21 DE JULIO 1982

# LA ESPERO

## (Esperantista Himno)

Poezio de
L. L. ZAMENHOF

Muziko de
F. de MENIL

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion;
Al la mond'eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento
Komprenante unu la alian
La popolo faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos
Ĝis la bela songo de l'homaro
Por eterna ben'efektiviĝos.

1100



# EXCMA. SRA. DOÑA SOLEDAD BECERRIL

MINISTRA DE CULTURA

## Presidenta de Honor del 42 Congreso Nacional de Esperanto



# SALUTO AL LA GEKONGRESANOJ

Karaj gesamideanoj:

Denove el la paĝoj de nia kongreslibro, mi salutas vin kore kaj invitas ĉiujn aktive partopreni en ĉiu programero de la Kongreso.

Málaga estas belega urbo, kiu nur per sia nomo altiras al nia memoro revon pri historiaj artaĵoj, malnova civilizacio kaj samtempe aktuala turisma graveco. Ĉar de la jaro 1959-a ne reokazis alia Hispana Esperanto-Kongreso en Málaga, kaj pro ĝia eksterordinara turisma kapableco kiu altiras amason da personoj nur preterpasantaj, kaj ne restantaj tro da tempo en la sama loko, eble, la tiea loĝantaro ne memoras pri Esperanto.

Nur la entuziasmo kaj laboro de la tiea esperantistaro evitas ke la flamo de nia idealo estingiĝu en Málaga.

Ĉijare ni havas bonan ekazon por studi niajn proprajn metodojn, kaj eblecojn en la eduka, turisma, k.a. sferoj kaj por diskonigi Esperanton inter la Malaga loĝantaro, kiel taŭgan ilon por la turista interkompreniĝo, sed antaŭ ĉio, por riĉigi nian propran scion pri nia movado kaj pri tiu belega regiono kiu, hodiaŭ, akceptas nin.

Al la membroj de L.K.K., kiuj solvis tiom da malfacilaĵoj per sia entuziasmo, mian plej koran saluton kaj dankemon, kaj mi invitas vin ĉiujn frate kaj en vera esperantista etoso travivi la kongresajn laborojn por ke vi alportu al viaj E-Grupoj novajn ideojn kun la celo atingi la progreson de Esperanto en nia Lando, kiel unu el la fundamentaj bazoj por inde festi post kelkaj jaroj la jarcenton de ESPERANTO.

**D-rino M. R. URUEÑA**
**(Prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio)**



# BONVENON AL ĈIUJ

La graveco de nia Movado postulas streĉi niajn fortojn por ke niaj jaraj kunvenoj sukcesu ĉiam kaj samtempe ĝi kuraĝigas por la estonto.

Estus bedaŭrinda ke Kongreso ne atingu efikajn rezultojn, pro la ne aktiva partopreno de niaj kongresanoj. La esperantistoj amas Esperanton kaj ĝin ŝatas kiel ilon por atingi la universalan fratecon kaj la mondan pacon. Sed, multfoje, ili timas ke siaj klopodoj ne atingu bonan sukceson.

Tiel, la plano de niaj estontaj taskoj alĝustiĝos al la aŭtentikaj cirkonstancoj de niaj konkretaj vivadoj. Estu ni ĉu multaj ĉu malmultaj, estas necese koni niajn fortojn por la malvolviĝo de niaj esperantistaj programoj. Tiamaniere, krome, ni plibonigos nerekte, la opiniojn de neesperantistoj pri Esperanto kaj la movado.

Aliflanke, estas evidente ke la Kongreso estas bonega okazo por interamikiĝi. La kongresanoj deziras, ĉiam, koni aliajn personojn samopiniantajn por kuraĝigi unu la alian. Pro tio, la programo proponas interesan ekskurson tra la Suma Marbordo, viziton al la urbo, artan vesperon, folkloran prezentadon, kaj bankedon. Tiel krom ŝatigi la artan aŭ turisman intereson, tiuj kiuj partoprenas la kongreson povos interŝanĝi malsamajn vidpunktojn, praktiki la lingvon kaj studi novajn agadmetodojn.

Finfine, kiel en la pasintaj kongresoj, la gesamideanoj kiuj tion deziros, povos ekzemeniĝi pri Esperanto, kaj, poste, valorigi siajn lingvosciojn per la koncerna diplomo.

Kiel Prezidanto de L.K.K. mi bonvenigas la gekongresanojn kaj deziras al ili agrablan restados en Malaga kaj fruktodonajn kunvenojn.

**ANDRES MARTIN GONZALEZ**
**(Prezidanto de L.K.K.)**

# COMITE DE HONOR DEL 42 CONGRESO NACIONAL DE ESPERANTO

Excma. Sra. Doña SOLEDAD BECERRIL
Ministra de Cultura (Presidenta de Honor del Congreso)

Excmo. Sr. D. JOSE PEDRO PEREZ LLORCA
Ministro de Asuntos Exteriores

Excmo. Sr. D. JUAN JOSE ROSON
Ministro del Interior

Excmo. Sr. D. PIO CABANILLAS GALLAS
Ministro de Justicia

Excmo. Sr. D. FEDERICO MAYOR ZARAGOZA
Ministro de Educación y Ciencia

Excmo. Sr. D. LUIS GAMIR
Ministro de Transportes, Turismo y Comunicaciones

Excmo. Sr. D. RAFAEL ESCUREDO RODRIGUEZ
Presidente de la Junta Autonómica de Andalucía

Magnífico y Excmo. Sr. D. ANTONIO PEREZ DE LA CRUZ
Rector de la Universidad de Málaga

Excmo. Sr. D. ENRIQUE LINDE CIRUJANO
Presidente de la Diputación Provincial de Málaga

Ilmo. Sr. D. PEDRO APARICIO SANCHEZ
Alcalde-Presidente del Excmo. Ayuntamiento de Málaga

Ilmo. Sr. D. JOSE IGNACIO FERNANDEZ BERJILLOS
Delegado Provincial del Ministerio de Cultura

D. JOSE SANCHEZ BLANCO
Presidente del Consejo de Administración de la Caja de Ahorros Provincial de Málaga

D. JUAN VELA PASTOR
Director General de la Caja de Ahorros Provincial de Málaga

D. JOSE LUIS COBOS AVILES
Presidente de la Asociación «Gran Fraternidad Universal» de Málaga

# COMITE ORGANIZADOR

| | |
|---|---|
| Presidente: | D. ANDRES MARTIN GONZALEZ |
| Vicepresidente: | D. ANGEL ARQUILLOS LOPEZ |
| Secretario: | D. JULIO HERRERO SEGURA |
| Vicesecretario: | D. RICARDO ALBERT REYNA |
| Cajera: | DOÑA PAQUI CORRALES GUERRERO |
| Vocales: | D. FERNANDO PRIETO LEON |
| | D. JESUS GARCIA MARTINEZ |
| | D. RAFAEL LOPEZ CASTILLA |
| | DOÑA CRISTINA TIRADO NARVAEZ |
| | DOÑA MARIA DOLORES GASPAR JIMENEZ |

# ESTRARO DE LA HISPANA ESPERANTO FEDERACIO (H.E.F.)

Prezidantino: D-rino MARIA RAFAELA URUEÑA ALVAREZ
Vicprezidanto: S-ro ANGEL DIEZ GARCIA
Sekretario: S-ro LUIS HERNANDEZ GARCIA
Vicsekretario: S-ro JACINTO URUEÑA ANTON
Kasistino: F-ino CARMEN CONDE LABAJO
Voĉdonanto: S-ro PEDRO NUEZ PEREZ
Voĉdonanto: S-ro VICTOR ORTIZ GRATAL
Voĉdonanto: S-ro FRANCISCO ZARAGOZA RUIZ
Voĉdonanto: S-ro ADONIS GONZALEZ MEANA
Voĉdonanto: S-ro TOMAS CASPE CEREIJO

# PREZIDANTOJ DE LA SEKCIOJ

Fervojista (H.E.F.A.): S-ro RAMON GIMENEZ FELIU
Turisma (H.T.E.S.): F-ino INES GASTON
Junulara (H.E.J.S.): S-ro MIGUEL ANGEL SANCHO PARDO

# HONORAJ PREZIDANTOJ

D-ro RAFAEL HERRERO ARROYO (+)
D-ro MIGUEL SANCHO IZQUIERDO

# HONORAJ MEMBROJ

S-ro FELIX DIEZ MATEO (+)
S-ro CAMILO VEIGA PREGO (+)
Prof. D-ro IVO LAPENNA
S-ro RAFAEL FIOL PAREDES
S-ro MARIANO CANTALAPIEDRA NIETO

Ĉefdelegito de U.E.A.: S-ro JUAN AZCUENAGA VIERNA
Ĉefredaktoro de BOLETIN: S-ro SALVADOR ARAGAY

# LA MARBORDO DE LA SUNO, DONACO POR NIAJ KONGRESANOJ

En Málaga, oni povas diri ke malvarmo estas preskaŭ nekonata ĉar termometro malofte indikas sub 11º C. En la monato Januaro de j. 1.884-a la blanka neĝo kovris nian provincon, kaj oni devis atendadi 70 jarojn por denove rigardi neĝeretojn falantajn sur niajn stratojn. Super nia marbordo pasas la izotermo de 20º C., ĝi estas la plej alta en la tuta Hispanio, kaj ĝi ebligas kultivi delikataĵojn kiel: sukerkanon, kotonon, agavon kaj tiujn kiujn la tuta Europo kultivas ne nature.

La Costa del Sol (La Marbordo de la Suno) estas longa je 150 km., ĝi komenciĝas je la limo de la provinco apud la vilaĝo Nerja tre konata ne nur pro ĝiaj plaĝoj sed ankaŭ dank'al ĝia eksterordinara teraso super la maro kie antaŭ jaroj, la Reĝo Alfonso XII-a haltis kaj rigardinte kaj admirinte neimagineblan pejzaĝon, li nomis ĝin «Balkono de Eŭropo». Antaŭ ol daŭrigi nian promenadon ni ne devas forgesi ke Nerja ankaŭ havas alian neforgeseblan mirindaĵon «Las Cuevas» (kavernoj el stalaktitoj kaj stalagmitoj) kie, de tempo al tempo, famaj dancistoj, kantistoj kaj aliaj dancas, kantas, aktoras...

Palmoj, larĝaj kaj longaj avenuoj, altaj kaj belegaj konstruaĵoj, antikva kastelo, eterna alkazabo, mirinda katedralo kaj nenombreblaj preĝejoj estas la urbo Málaga, kaj ne malproksime estas Torremolinos, Kvartalo de nia ĉefurbo. La aŭtoro de la verko «The drifters» (Filoj de Turomuelejoj) diras «Se viro, malgraŭ timideco ne sukcesas inter virinoj de Turomuelejoj, estas pli bone al li abdiki kiel viro».

Torremolinos staras je la spronoj de la montoĉeno de «Mijas» kiu protektas ĝin de la Nordaj ventoj, kaj sur roka montareto kontraŭ la Mediteranea Maro. La nomo Torremolinos devenas de muelejoj kiujn oni konstruis por mueli tritikon, kaj gvatejoj aŭ turoj kiujn oni starigis sur la rokoj kiel ĉiamajn belfridojn kontraŭ la atakoj de la bereberaj piratoj kiuj detrunadis niajn marbordojn.

Ĉiaj amuzaĵoj, luksaj hoteloj, tipaj vendejoj, dancejoj, kluboj kaj, kompreneble, belegaj plaĝoj estas Torremolinos.

Pasinte la limon de Benalmádena (alia amuza loko), oni alvenas al Fuengirola, tre bela urbo kiu antaŭ kelkaj jaroj gajnis la unuan premion pri beleco. Promenante tra ĝi oni vidas blankan preĝejon sur la centro de la placo kiu estas ornamita per belaj floroj, palmoj kaj fontano ĉirkaŭata de floroj kaj tropikaj plantoj. Mulnombraj mallarĝaj stratoj kondukas nin al kolosaj hoteloj kiuj staras apud ĉarma kaj tre longa aleo simila al bordero de la granda



maro, kaj tie ne mankas tipaj vendejoj nek luksaj dancejoj, kluboj kaj ĉiaj amuzaĵoj.

Antaŭ ol eliri el Fuengirola, ne forgesu rigardi la belan kastelon trans la plaĝo, sur promontoro, konstruitan de la kalifoj de Kordobo. Estas facile ĝin trovi, rigardu la horizonton kaj tie ĝi staras kiel eterna ornamaĵo.

Estas neeble skribi pri la provinco de Málaga sur kelkaj paperfolioj, kaj pro tio, per tiu ĉi mallonga artikolo, vi nur konos iomete pri ĝi, sed mi bone scias ke vi imagas la ceterajn mirindaĵojn kio trankviligas min.

Ankoraŭ restas io kion mi ne lasos en mia inkujo, ĉar parolante pri Torremolinos mi menciis «Mijas», belegan blankan vilaĝeton starantan sur monto, ĉirkaŭatan de montaro kovrita de verdaj pinoj. La «Azenotaksio» estas unu el la ĉarmaĵoj kiujn vi trovos en tiu pitoreska vilaĝeto. Tra mallarĝaj kaj deklivaj stratetoj vi promenos por atingi unu el la malplej grandaj «Plaza de Toros»; belegajn placetojn kaj par-

kojn vi rigardos antaŭ ol atingi la belvederon por fini la promenadon rigardante la plej belajn pejzaĝojn. Ne forgesu fotilon ĉar ĝi estas pli bona ol manĝado.

Por fini akompanu min tra tiu larĝa aŭtoŝoseo, ĉar ne malproksime troviĝas Marbella (Belamaro). Oni diras ke la Reĝino Isabel nomis ĝin Marbella, kiam ŝi rigardis la Mediteranean Maron kaj diris la frazon: «Kia bela maro»; kvankam la toponimio Marbella devenas de la Kapitano Maharbal kiu konstruis la fortreson nomitan Maharbella. Tamen, Marbella estas vere bela kaj ne gravas la signifo. Estus senfine paroli kaj paroli pri belecoj kaj ĉarmoj de Marbella; vizitinte Torremolinos kaj Fuengirola, imagu alian similan urbon sed pli riĉan kaj vi konos ĝin.

Kongresanoj, tiu-ĉi artikolo, estas kvazaŭ antaŭparoleto pri nia provinco, pro tio vi devas foliumi kaj plu legi unu el la plej belaj verkoj naturaj de nia mondo.

**Angel Arquillos López**



# SIMPOZIO PRI FAKAJ ESPERANTISTAJ ORGANIZOJ EN HISPANUJO

Laŭ sugesto de la Prezidanto de la Organiza Komitato de la nunjara H.E.K., inter la diversaj distraj, kulturaj kaj movadaj programeroj okazontaj dum la kongresaj tagoj, estos simpozio pri Fakaj E-Organizoj en nia Lando kaj mi invitas ĉiujn interesatojn partopreni.

La Simpozio havos kiel fundamentan bazon konigi al ĉiuj la diversajn nunajn fakojn en la hispana E-movado kaj la rilatojn ekzistantajn inter ili kaj samtempe studi la eblecon pliampleksigi tiun necesan kunlaboron, ĉar esence tiuj fakaj organizoj en la sfero de sia agado celas la disvastigon de Esperanto inter siaj membroj.

Ĉiu kiu finis la elementan kurson de Esperanto, ĉu per persona ĉeesto en la kursoj aranĝitaj de la E-Grupo de la lia loĝurbo, ĉu per koresponda kurso deziras, ĝenerale, rilati kun aliaj samideanoj kun la celo praktiki kaj perfektigi la lingvoscion, sed, samtempe, kelkaj deziras rilati kun geesperantistoj kiuj, pere de la internacia lingvo Esperanto, povas profundigi en la konon de ilia ideo aŭ hobio.

Por la unuaj, la aliĝo al la E-Grupo se tia ekzistas en la urbo kie la interesato loĝas, estas ne nur konsilinda, sed konsilenda kaj en tiuj urboj kie estas kelkaj entuziasmuloj, sed ankoraŭ ne estas E-Grupoj kial ne eklabori por starigi tie E-Grupon? Vere, tio estas, laŭ mia opinio, unu el la atingotaj celoj por la celebro de la jarcento de Esperanto la jaron 1.987-an.

Kiel supra organizo en la tuta Lando estas la Hispana Esperanto-Federacio al kiu ĉiu aktiva esperantisto devus aparteni, ĉar la forteco de nia movado dependas, precipe, de la nombro de membroj.

La Fakaj Organizoj estas esence internaciaj, ĉar ili interrilatigas esperantistojn kiuj, krom pri la lingvo, interesiĝas pri speciala temo aŭ hobio. Dekoj da ili estas en la tuta mondo, sed en nia Lando nur ekzistas kelkaj, almenaŭ organizitaj, kaj pri ili mi nun parolos iomete.

Unue, estas H.E.J.S. (Hispana Esperantista Junulara Sekcio) la junulara sekcio de la Federacio fondita de S-ro Salvador Aragay kaj kies

aktivecoj estas interesaj; elstarante en la lastaj jaroj la organizado de sukcesaj H.E.J.S.-Tendaroj. Al la junulara sekcio de H.E.F. rajtas a parteni ĉiu H.E.F.-ano ne atinginta la aĝon de 25 jaroj. De tiu sekcio devas veni la nova energio por la antaŭeniro de Esperanto.

H.E.F.A. (Hispana Esperantista Fervojista Asocio) estas faka asocio aliĝinta al H.E.F. kaj kies membroj estas fervojistoj. Kompreneble la agado de tiu Asocio malvolviĝas en la fervojista sfero kaj mi povas diri ke, ĝenerale, ĝiaj klopodoj atingas bonajn sukcesojn.

Aliaj Fakaj E-Organizoj kiel I.L.E.I., M.E.M. «Asocio Antón Balagué», H.E.K.A., k.t.p. ne estas aliĝintaj al la Federacio, sed kun ĉiuj ekzistas bonaj kaj amikaj interrilatoj kiujn, se eble, ni klopodos plibonigi en la estonteco.

Paroli pri la hispana sekcio de I.L.E.I. estas paroli pri aro da entuziasmaj kaj laboremaj esperantistoj kiuj gvidate de Prof. Francisco Zaragoza Ruiz sukcese atingis diskonigi Esperanton en la tuta duoninsulo kaj ampleksigi la nombron de membroj de H.E.F., ĉefe en urboj kie antaŭe ne estis esperantistoj. La gratulinda laboro kiun faras la hispana sekcio de I.L.E.I. meritas nian apogon kaj helpon.

En lasta tempo oni starigis en Hispanujo, la Esperantan Asocion «Antón Balagué», hispana sekcio de M.E.M. (Mondpaca Esperantista Movado), kiu celas labori por la mondpaco pere de la internacia lingvo Esperanto. La nomo elektita de la hispana sekcio de M.E.M. estas tiu de la fondinto de la movado kaj tiel ili memorigas pri tiu hispana batalanto kiu nomiĝis Antón Balagué.

Fine, mi deziras mencii la Hispanan Esperantistan Katolikan Asocion (H.E.K.A.) al kiu apartenas, ĉiu katolika esperantisto kiu deziras aliĝi. Bedaŭrinde, pro manko de la necesaj informoj la nombro de aliĝintoj al tiu-ĉi organizo ne estas granda.

En la simpozio la reprezentantoj de ĉiu organizo kaj eĉ de tiuj ne specife menciitaj parolos dum mallonga tempo pri siaj celoj, labormetodoj, rilatoj kun aliaj organizoj, sukcesoj kaj malsukcesoj kaj pri la laboro realigota en la estonteco.

Ĉi tiu simpozio devas esti la komenco de pli profunda kaj serioza studo de la diversaj problemoj kiun nuntempe travivas la E-movado en Hispanujo, ĉar nur per aktiva kaj serioza kunlaborado inter ĉiuj, ni povos atingi la triunfon.

**L. HERNANDEZ**



# VIVO DE ZAMENHOF

1859.—Naskiĝo de Ludoviko Lazaro, unua filo de Marcus Zamenhof kaj Rosalia Solfer en Byalistock (Pollando).
1879.—En la monato Junio, Zamenhof finis la gimnazian kurson.
1880.—Li studis Medicinon en la Universitato de Moskvo.
1881.—Li revenas hejmen kaj daŭrigas en Varsovio la Medicinan studadon.
1885.—En Vieno (Aŭstrujo) li studas Oftalmologion.
1887.—Ruse aperis la «FUNDAMENTO DE LA INTERNACIA LINGVO», ĝi estis subskribita per la pseŭdonimo «D-ro ESPERANTO».
1887.—Geedziĝo de Zamenhof kaj Klara Silbernik.
1888.—Aperas la «Dua Libro de l'Lingvo Internacia».
1889.—Oni eldonas la unuan Adresaron, ĝi enhavas mil diverslandajn nomojn, kaj aperas en Nüremberg la unua E-revuo.
1905.—Okazas en Boulogne Sur Mer (Francio) la I-a Universala Kongreso de Esperanto.
1909.—Okazas en Barcelona la 5-a U. Kongreso sub la Alta Protektado de la Reĝo de Hispanujo Alfonso la XIII-a, kun la persona ĉeesto de D-ro Zamenhof kaj edzino.
1917.—Forpaso de D-ro Zamenhof en Varsovio.




# 42-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

(16-21-an Julio 1982-a)

Kongresejo: Caja de Ahorros Provincial de Málaga
Kunvenejo: Centro G.F.U. - Trinidad Grund, 28-2º drcha.

## ĜENERALA PROGRAMO

**Vendredo 16-an**

17 h. Akcepto de la gekongresanoj kaj disdonado de dokumentoj (Kongresejo).
20,30 h. Interkrona Vespero (Kunvenejo).

**Sabato 17-an**

9,30 h. Ekzamenoj (Elementa kaj Supera) - (Kunvenejo).
9,30 h. Kunsido de la estraro de H.E.F. kun delegitoj de Grupoj kaj sekcioj (Kongresejo).
12 h. Solena Malfermo de la Kongreso (Kongresejo). Oficiala Foto.
19 h. Esperantlingva prelego, de S-ro Giordano Moyá pri la temo «LA ESPERANTISMO KIEL HISTORIA FAKTORO» (Kongresejo).
22,30 h. Folklora andaluzia festo (Paseo del Parque).

**Dimanĉo 18-an**

9 h. Vizito al la ĉefaj vidindaĵoj de la urbo.
13 h. Santa Meso (Preĝejo Stella Maris)
18 h. Fakaj Kunvenoj (Kunvenejo)
22 h. Vespermanĝo kaj festo (Barbacoa)

**Lundo 19-an**

10 h. Simpozio pri instruado de Esperanto (Kongresejo)
17 h. Ĝenerala Kunsido de H.E.F. (Kongresejo)
20 h. Arta Vespero (Kongresejo)

**Mardo 20-an**

9 h. Simpozio pri Fakaj Esperantistaj Organizoj en Hispanujo (Kongresejo)
12 h. Hispanlingva prelego de S-ro Andrés Martín pri la temo: LINGVAJ RIMEDOJ EN ESPERANTO. (Kongresejo).
18 h. Solena Fermo de la Kongreso (Kongresejo)
22 h. Oficiala Bankedo.

**Merkredo 21-an**

8,30 h. Tuttaga ekskurso tra la Suna Marbordo.

**RIMARKOJ.**—Dum la kongrestagoj funkcias en la kongresejo, Libro-servo de H.E.F. kun la plej gravaj novaĵoj.
La 19-an kaj 20-an funkcios speciala poŝta oficejo, kie oni uzos specialan memorigan stampilon.

# NIAJ ĈIJARAJ PRELEGANTOJ



**S-ro Giordano Moyá Escayola**

Li naskiĝis en Terrassa en 1913 kaj deknaŭjara konatiĝis kun Esperanto per koresponda kurso de «Zamenhof Instituto» el Barcelono, kies direktoro estis Jozefo Anglada Prior. En 1935 kaj 1936 ĉeestis kurson de Esperanto, en la Grupo Lumon, gvidata de Sebastiano Charler kaj partoprenis en la 18-a Kataluna Esperanto-Kongreso en Manresa 1.ª-2.ª junio 1936, kelkaj semajnoj antaŭ la eksplodo de nia civilmilito.

Post la ŝtormo en 1949 ĉeestis esperantan kurson, gvidata de S-ro Charler kaj laboris por la 12.ª Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Terrassa en la jaro 1951. Poste gvidis kursojn kaj apartenis al la estraro de H.E.F. kiel voĉdonanto sub la prezidantecoj de Miguel Sancho Izquierdo kaj Angel Figuerola Aunque.

Li estis premiita en la Konkurso Comella-Bassols en 1968, atingis duan premion en laboraĵo por Esperanto-tagoj en la Universitato de Budapest en 1971 kaj meritis Subpremio pri prozajo en la 17.º Internaciaj Floraj Ludoj en

Tortosa, 1978. Nuntempe apartenas al la redakcia komitato de «Boletín». En la pasinta jaro aperis lia verko en kataluna lingvo «L'Aventura Humana». Estas kunredaktoro de la dulingva Revuo «Social-humanista Gazeto», kiu publikiĝas en la baza lingvo Esperanto kun eldonoj en tradukoj kataluna, kastilia, franca, itala, germana kaj portugala.

«**La Esperantismo kiel Historia Faktoro**». Jen estas la temo de la esperanta parolado en la nunjara Kongreso en Malaga.

Diras la Espero: «En la mondo venis nova sento, ... Al la mond eterne militanta. Ĝi promesas sanktan harmonion». Se pere de Esperanto alvenos unuafoje en la Historio tiu sopirata paca epoko, la rolo de la esperantismo fariĝos la precipa historia faktoro. Sed por tio ne sufiĉas la sopirado nek la revado. Sendube estas necese konscia forta volo por efika agado por la paco. La risko, ke atommilito ruinigu la homaron estas la plej aktuala danĝero, kiu minacas la mondon. Ni konsciu pri la graveco kaj vasteco de nia agado. Nenion farante atingos nenion. Ni vekiĝu el la letargio de la nun stagnanta esperantismo. Nur grandaj idealoj povas mobilizi grandajn klopodadojn kaj nur tiu mobilizado povas vigligi tiel same la movadon kiel la lingvon.

*

## S-ro Andrés Martín González

Li naskiĝis en vilaĝo de la provinco Cáceres, antaŭ 44 jaroj kaj de 1963-a li instruas en lernejoj de Unuagrada Instruado kaj de Ĝenerala Baza Edukado.

En 1960-a li atingis la titolon de Nacia Instruisto, kaj en 1973-a li fariĝis licenciulo pri Pedagogio en la Universitato Complutense. Li estas kompetentulo pri Speciala Edukado kaj diplomito pri Librotenado kaj Nutrado. Dum sia juneco, li studis la naŭ unuajn kursojn de la pastra kariero kaj de 1975-a li laboras kiel Profesoro de Speciala Edukado en Málaga, escepte de la kurso 1979-a-1980-a dum kiu li apartenis al SOEV (Servo de Lerneja kaj Alvokiĝa Orientado) prizorgante la lernantaron de kvar Naciaj Kolegioj.

Li esperantiĝis en 1980-a kaj la ĵus pasintan jaron li partoprenis la Hispanan Kongreson de Esperanto. Li verkas ofte artikolojn pri Esperanto kaj la Movado, kaj en septembro de 1981-a li kreis la malgrandan revuon «Folioj por praktikado» kaj nuntempe li gvidas, kunlaborante kun ILEI, korespondan kurson.

# HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

| | |
|---|---|
| 1.—1920 | BARCELONA |
| 2.—1921 | ZARAGOZA |
| 3.—1923 | VALENCIA |
| 4.—1924 | BILBAO |
| 5.—1925 | CORDOBA |
| 6.—1926 | MADRID |
| 7.—1928 | SEVILLA |
| 8.—1929 | OVIEDO |
| 9.—1930 | MADRID |
| 10.—1933 | SANTANDER |
| 11.—1936 | BARCELONA |
| 12.—1951 | TERRASSA |
| 13.—1952 | VALENCIA |
| 14.—1953 | BILBAO |
| 15.—1954 | ZARAGOZA |
| 16.—1955 | GIJON |
| 17.—1956 | BARCELONA |
| 18.—1957 | MADRID |
| 19.—1958 | CASTELLON DE LA PLANA |
| 20.—1959 | MALAGA |
| 21.—1960 | PONTEVEDRA |
| 22.—1961 | PALMA DE MALLORCA |
| 23.—1962 | VALLADOLID |
| 24.—1963 | BARCELONA |
| 25.—1964 | VALENCIA |
| 26.—1965 | PALENCIA |
| 27.—1966 | BILBAO |
| 28.—1967 | ZARAGOZA |
| 29.—1969 | LA LAGUNA |
| 30.—1970 | MIERES |
| 31.—1971 | ALICANTE |
| 32.—1972 | VIGO |
| 33.—1973 | MADRID |
| 34.—1974 | VALLADOLID |
| 35.—1975 | LERIDA |
| 36.—1976 | EL FERROL |
| 37.—1977 | SABADELL |
| 38.—1978 | LEON |
| 39.—1979 | GIJON |
| 40.—1980 | MADRID |
| 41.—1981 | MURCIA |
| 42.—1982 | MALAGA |

# UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1.—1905 Boulogne sur Mer (F)
2.—1906 Géneve (CH)
3.—1907 Cambridge (GB)
4.—1908 Dresden (D)
5.—1909 Barcelona (E)
6.—1910 Washington (USA)
7.—1911 Antwerpen (B)
8.—1912 Krakow (PL)
9.—1913 Bern (CH)
10.—1914 París (F) Ne okazis pro la milito
11.—1915 S. Francisco (USA)
12.—1920 Den Haag (NL)
13.—1921 Praha (CS)
14.—1922 Helsinki (SF)
15.—1923 Nürnberg (D)
16.—1924 Wien (A)
17.—1925 Géneve (CH)
18.—1926 Edinburgh (GB)
19.—1927 Danzing
20.—1928 Antwerpen (B)
21.—1929 Budapest (H)
22.—1930 Oxford (GB)
23.—1931 Krakow (PL)
24.—1932 París (F)
25.—1933 Koln (D)
26.—1934 Stockholm (S)
27.—1935 Roma (I)
28.—1936 Wien (A)
29.—1937 Warszawa (PL)
30.—1938 London (GB)
31.—1939 Bern (CH)
32.—1947 Bern (CH)
33.—1948 Malmo (S)
34.—1949 Bournemouth (GB)
35.—1950 París (F)
36.—1951 München (D)
37.—1952 Oslo (N)
38.—1953 Zagreb (YU)
39.—1954 Haarlem (NL)
40.—1955 Bologna (I)
41.—1956 Kobenhaven (DK)
42.—1957 Marseille (F)
43.—1958 Mainz (D)
44.—1959 Warszawa (PL)
45.—1960 Bruselo (B)
46.—1961 Harrogate (GB)
47.—1962 Kobenhaven (DK)
48.—1963 Sofia (BG)
49.—1964 Den Haag (NL)
50.—1965 Tokio (J)
51.—1966 Budapest (H)
52.—1967 Rotterdam (NL)
53.—1968 Madrid (E)
54.—1969 Helsinki (SF)
55.—1970 Wien (A)
56.—1971 London (GB)
57.—1972 Portland (USA)
58.—1973 Beograd (YU)
59.—1974 Hamburgo (D)
60.—1975 Kobenhaven (DK)
61.—1976 Athinai (GR)
62.—1977 Reykjavij (IS)
63.—1978 Varna (BG)
64.—1979 Luzern (CH)
65.—1980 Stockolm (S)
66.—1981 Brasilia (BR)
67.—1982 Antwerpen (B)
68.—1983 Budapest (H)

Por koncizeco la landoj estas indikitaj laŭ la internaciaj aŭtomobilaj simboloj.

# LA KONGRESA SPIRITO

La natura kaj logika festo de la tutmonda esperantistaro estas, ja, la datreveno de la naskiĝtago de la Fondinto.

En tiu dato, en plej etaj lokoj en la mondo, eĉ en tiuj kie sole loĝas unusola esperantisto, okazas festo, pli malpli esotera, pli malpli brua kaj kamaradeca. Unuopuloj, en lokoj malproksimaj de samideanaj fokusoj, ankaŭ festas siamaniere kaj meditas pri la bonŝanco kiu enigis ilin en niajn vicojn, kiuj konsistigas eksponenton de homa bonvolo kaj komprenemo.

Sed, tiu festo, simpatia kaj alloga, estas, kompreneble, limigita al la kunestado de samlokaj samideanoj, kiuj, laŭlonge de la jaro, trovas multajn okazojn por renkontiĝi, dum la diversaj manifestadoj de la esperantista vivo. Ni povas aserti ke tiu festo estas kiel la plifirmigo kaj konfirmo de la grandfamilia spirito de la tutmonda samideanaro.

Sed, ĉiu esperantisto konscias ke sia aniĝo signifas partoprenon en granda, senlima kaj tutmonda entrepreno. Revuoj, gazetoj, bultenoj kaj radioelsendoj konfirmas tion al ciuj, kaj tiuj rimedoj estas la kutimaj argumentoj kiujn ni proponas por konvinki la dubemulojn kaj skeptimulojn.

Tamen, ni ĉiuj scias ke la vera eksponento de nia forto kaj de nia vero, la fakto, videbla kaj aŭdebla, kiu pruvas nian pravon, estas la kongresoj. Eĉ la naciaj kongresoj de Esperanto, kiuj povus efektiviĝi sen bezono de Esperanto, estas la frapa pruvo de la kapablo de nia lingvo por solvi la Kaoson en kiu dronas nia mondo.

Ni ĉiuj devas konscii pri la forta impreso ĉe eksteruloj, farita de la kongresa efektiviĝo; ĝi konvinkas tiujn kiuj, ĝis lasta horo, primokis Esperanton, kaj tiu estas la kialo por la nepra organizado de la kongresoj, al kies elmontrado la organizantoj devas inviti la lokan kaj tutlandan gazetaron, por pligrandigi la efekton de tia pruvo.

Por ni, esperantistoj, kiuj bone taksas la spiritan flankon de nia movado, kaj konscias pri la kora aspekto de la kongresaj renkon-

tiĝoj, la dato de ĉiu venonta kongreso estas sopirata de longaj monatoj, ne nur pro la ideala signifo de la kunveno, sed ankaŭ, pro la pleruzado okazonta, fare de la persona renkontiĝo kun malnovaj samideanaj konatuloj, pli familianoj ol amikoj, veraj fratoj, al kiuj ni nin turnas dum tiu festo, kiu estas, ĉefe, la festo de la amikeco, specimeno de estonta tutmonda amikaro.

Tia estas la vera kongresa etoso, kiun oni bone taksas, kiam pro neeviteblaj cirkonstancoj oni ne povas partopreni ĝin. Nur tiam oni konscias pri la kongresa neceso, por satigi nian spiritan deziron.

Vojaĝoj, ekskursoj, festoj kaj festenoj, eĉ la kutimaj solenaĵoj, partopreno de elstaruloj, k.t.p. estas nedubindaj allogoj, kiuj konsistigas la kongresan atmosferon, kompletigante ĝin. Sed, por ĉiu vera, serioza samideano, la vera esenco de la afero estas tiu persona kontakto, kiu naskas la kongresan spiriton, tiun heroldon de la estonta kunfrata sento, kiu regos en la mondo kiam ĉiuj povos senti kaj «diri» al ĉiuj homoj, kie ajn sur la tero, en nia komuna lingvo, ke ili estas niaj fratoj, kaj ke ili tion bone komprenos, ĉar tiam, Esperanto fosis sian lastan sulkon, sur la kampo de la tutmonda kompreno.

**CIRANO**

# LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.
3. La plibonigistoj diskutu: vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu.
4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravaĵon.
6. Verkante en Esperanto, ne kredu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru ke tial internacia organizaĵo estas necesa.
9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povus ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.

# POLA ESPERANTO-TEATRO



## «A. Grabowski»

Pola Esperanto-Teatro estis fondita en la jaro 1971. La prapremiera prezentado okazis kadre de «Ora Pola Aŭtuno» —Internacia Feriado— en Miedzygorze (Pollando) septembre 1972.

PET estas profesia teatro, kiu konstante agas en Esperantujo, okupiĝante pri esperantaj kulturaj aferoj. La Teatro havas sufiĉe grandajn sukcesojn kaj ĝi estas fame konata inter esperantistoj.

En la jaro 1973 PET faris grandan 8-monatan turneon tra Usono, laŭ la invito de la prezidanto de la Universitato en Fort Lauderdale —prof. dr. S. J. Drake. PET spektaklis en 30 ŝtatoj de Usono, ludante 60 prezentadojn en Esperanto. Post la reveno al la eŭropa kontinento la Teatro vizitis multajn landojn, ludante inter alie dum diversaj kongresoj, renkontiĝoj kaj E-festoj. PET spektaklis dum la Universalaj Kongresoj en: Hamburgo (1974), Rejkjaviko (1977), Varno (1978), Stokholmo (1980).

La Teatron kaj ĝiajn geaktorojn bone konas spektantoj en: Aŭstrio, Belgujo, Ĉehoslovakio, Danlando, FRGermanujo, Francujo, Britujo, GDR, Hispanujo, Hungarujo, Italio, Jugoslavio, Luksemburgo, Svedujo, Bulgarujo, Islando.

En la repertuaro de PET troviĝas teatraĵoj de polaj dramverkistoj: «Proksima nekonato» - psikologia komedio de Al.Scibor-Rylski (trad. J. Grum). «La hipnoto» - komedio de A. Cwojdzinski (trad. K. Pienkiewicz), «Malfermu la pordon» - dramo de K. Choinski (trad. K. Pienkiewicz). «Familia vivo» - teatra ŝerco de S. Grodzienska (trad. K. Pienkiewicz). Scenoj de la poemo «Sinjoro Tadeo» de A. Mickiewicz (trad. A. Grabowski), kiel rapsodia teatro.

PET konsistas nur el 2 personoj. Ĉi tiuj 2 personoj scipovas fari ĉion, kion oni devas fari en la teatro, same pri la artaj, kiel pri la teknikaj aferoj. Por ni —esperantistoj— ci tio estas granda avantaĵo, ĉar (kiel oni bone scias) pli facile estas inviti kaj akcepti malgrandan trupon. Des pli, ke niaj Kluboj ne disponas pri veraj teatraj salonegoj. PET ĉiam preparas siajn teatraĵojn tiamaniere, ke oni povu prezenti ilin en ĉiaj kondicoj, klubejaj, salonaj, eĉ en mezgrandaj privataj loĝejoj.

Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski diplomitiĝis en la Akademio kaj Film-Arto en Lodzo. Post la diplomitiĝo dum 15 jaroj ili ludis en diversaj teatroj, kunlaborante samtempe kun Pola Radio, Televido kaj Filmo.

**(redaktis Jerzy Grum.)**

# LISTO DA GEKONGRESANOJ

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Manuel Manteca López | Málaga |
| 2. | Señora de Manteca | Málaga |
| 3. | Francisco Zaragoza Ruiz | Callosa de Segura (Alicante) |
| 4. | Señora de Zaragoza | Callosa de Segura (Alicante) |
| 5. | Evaristo Gil Pallares | Barcelona |
| 6. | José Palmero Pérez | La Laguna (Tenerife) |
| 7. | Inés Gastón | Zaragoza |
| 8. | Miguel Martínez Marín | Zaragoza |
| 9. | María Teresa Carnicer | Zaragoza |
| 10. | Luis de Otaola y Faón | Bilbao |
| 11. | Gian Carlo Fighiera | Madrid |
| 12. | Ada Fighiera Sikorska | Madrid |
| 13. | Faustino Castaño Vallina | Gijón (Oviedo) |
| 14. | María Angeles García González | Gijón (Oviedo) |
| 15. | Honorio Castaño García | Gijón (Oviedo) |
| 16. | Angel Castaño García | Gijón (Oviedo) |
| 17. | Manuel López Serna | Alicante |
| 18. | Concha Hernández Ballester | Alicante |
| 19. | Concha López Hernández | Callosa de Segura (Alicante) |
| 20. | Alvaro Mellado López | Callosa de Segura (Alicante) |
| 21. | Ezequiel Mellado López | Callosa de Segura (Alicante) |
| 22. | Zaida Mellado López | Callosa de Segura (Alicante) |
| 23. | Francisco Ruiz Postigo | Alhaurín de la Torre (Málaga) |
| 24. | Elena Vinuesa Gil | Alhaurín de la Torre (Málaga) |
| 25. | Angel Mañero González | Valencia |
| 26. | María Teresa Martí Monfort | Valencia |
| 27. | Antonio Grau Fons | Tabernes Valldigna (Valencia) |
| 28. | Pascual Gil Figuer | Barcelona |
| 29. | Manuel Alcubilla Gallardo | Madrid |
| 30. | Vicente Molins Reig | Callosa de Segura (Alicante) |
| 31. | Luis Serrano Pérez | Sabadell (Barcelona) |
| 32. | Vicente Hernández Llusera | Sabadell (Barcelona) |
| 33. | Magdalena Royo Cruellas | Sabadell (Barcelona) |
| 34. | Carmen Sanvicente Brosa | Sabadell (Barcelona) |
| 35. | Teresa Gabarra Sala | Sabadell (Barcelona) |
| 36. | Joan Sala Campamá | Sabadell (Barcelona) |
| 37. | Carmen Conde Labajo | Valladolid |
| 38. | María García Martín | Valladolid |
| 39. | Angel Díez García | Valladolid |
| 40. | Antonio Gamboa y Sánchez | Valladolid |

| | | |
|---|---|---|
| 41. | Paulita Prieto Sanjosé | Valladolid |
| 42. | Luis Hernández García | Valladolid |
| 43. | María Rafaela Urueña | Valladolid |
| 44. | Jacinto Urueña Antón | Valladolid |
| 45. | Carmen Alvarez López | Valladolid |
| 46. | Ricardo Manzanera Tarín | Cheste (Valencia) |
| 47. | Pilar Guillén | Cheste (Valencia) |
| 48. | Enrique Arnau Prosper | Cheste (Valencia) |
| 49. | Francisco Manzanera Tarín | Cheste (Valencia) |
| 50. | José Ivern Más | Barcelona |
| 51. | José Climent Grañana | Barcelona |
| 52. | Miguel Angel Sancho Pardo | Madrid |
| 53. | Andrés Martín González | Málaga |
| 54. | Angeles Díaz | Oviedo |
| 55. | Rafael Palacios Herranz | Bilbao |
| 56. | María Luisa San Martín | Bilbao |
| 57. | Francisco Aliaga Rocafull | Puebla Vallbona (Valencia) |
| 58. | Francisca de Yruegas del Río | Madrid |
| 59. | Angel Arquillos López | Málaga |
| 60. | Salvador Aragay Galbany | Barcelona |
| 61. | Josefina Girona Ribé | Barcelona |
| 62. | Carlos Aragay Girona | Barcelona |
| 63. | Jaume Aragay Pujols | Barcelona |
| 64. | Rosa Galbany Cusido | Barcelona |
| 65. | Clementina Tranque Iglesias | Valladolid |
| 66. | Mercedes Tranque Iglesias | Valladolid |
| 67. | Jesús García Martínez | Málaga |
| 68. | María Jesús Martín Andrés | Palencia |
| 69. | Víctor Ortiz Gratal | Zaragoza |
| 70. | María Pilar Bardina | Zaragoza |
| 71. | Carlos Torralba Rovira | Tarragona |
| 72. | Ramón Martí Sanz | Villafranco del Guadalquivir (Sevilla) |
| 73. | Eleuterio Moreno García | Málaga |
| 74. | Ana María Quintero Alvarez | Málaga |
| 75. | Faustina Martínez Guillen | Vilanova i Geltrú (Barcelona) |
| 76. | Teresa Muntané Más | Vilanova i Geltrú (Barcelona) |
| 77. | Lourdes Martínez Catalán | Vilanova i Geltrú (Barcelona) |
| 78. | Restituto Albero García | Burjasot (Valencia) |
| 79. | Giordano Moya Escayola | Tarrassa (Barcelona) |
| 80. | Manuel Martín Gómez | Madrid |
| 81. | Francisca Sánchez García | Madrid |
| 82. | Carlos Castañón Adalia | Valladolid |

| | | |
|---|---|---|
| 83. | Julio Bueno Cortés | Vigo (Pontevedra) |
| 84. | Josefina Fernández López | Vigo (Pontevedra) |
| 85. | Celestino Pousa Veloso | Vigo (Pontevedra) |
| 86. | Rosa Costas Bastero | Vigo (Pontevedra) |
| 87. | Pio Móa Banga | Vigo (Pontevedra) |
| 88. | María Pilar Montenegro Sanjurjo | Vigo (Pontevedra) |
| 89. | J. Carlos Quintas Montero | Vigo (Pontevedra) |
| 90. | Jaime Canoa González | Vigo (Pontevedra) |
| 91. | Grupo Esperantista Vigués «Paco kaj Amo» | Vigo (Pontevedra) |
| 92. | Frateco, Esperanto-Societo | Zaragoza |
| 93. | Antonio Marco Botella | Zaragoza |
| 94. | María Pilar Goyane de Marco | Zaragoza |
| 95. | Herminia Gil Alvarez | Zaragoza |
| 96. | Matilde Pimentel López | Almería |
| 97. | José María Bernabeu Franco | Callosa de Segura (Alicante) |
| 98. | Dolores Egea de Bernabeu | Callosa de Segura (Alicante) |
| 99. | Antonio Sánchez Belda | Callosa de Segura (Alicante) |
| 100. | Dolores Serrano Gilabert | Callosa de Segura (Alicante) |
| 101. | Astura Esperanto Asocio | Gijón (Oviedo) |
| 102. | Sacramento Collado Llana | Gijón (Oviedo) |
| 103. | Adonis González Meana | Gijón (Oviedo) |
| 104. | Angelita Vega Rodríguez | Gijón (Oviedo) |
| 105. | Santiago Mulas Gallego | Gijón (Oviedo) |
| 106. | Susana Mulas Rocas | Gijón (Oviedo) |
| 107. | María Pilar Alonso Moro | Gijón (Oviedo) |
| 108. | José García Alvarez | Gijón (Oviedo) |
| 109. | Marina Piquero | Gijón (Oviedo) |
| 110. | Julio Argüelles García | Gijón (Oviedo) |
| 111. | Isabel García Menéndez | Gijón (Oviedo) |
| 112. | Luis Muñiz Martínez | Gijón (Oviedo) |
| 113. | Fco. José Sastre Galache | Gijón (Oviedo) |
| 114. | Florencia Sánchez Villar | Gijón (Oviedo) |
| 115. | Branka Leontic | Yugoslavia |
| 116. | Juan Régulo Pérez | La Laguna (Tenerife) |
| 117. | Carmen Rodríguez Hernández | La Laguna (Tenerife) |
| 118. | Argentina García Ceñal | Gijón (Oviedo) |
| 119. | Manuel Fernández Suárez | Gijón (Oviedo) |
| 120. | Gervasio Colunga Fernández | Gijón (Oviedo) |
| 121. | Maribel Soriano Marco | Zaragoza |
| 122. | José Antonio Fleta Zaragozano | Zaragoza |
| 123. | Pedro Alcedo Pico | Bilbao |

| | | |
|---|---|---|
| 124. | Rosa Blay Calatayud | Villafranco del Guadalquivir (Sevilla) |
| 125. | María Teresa Martí Blay | Villafranco del Guadalquivir (Sevilla) |
| 126. | María Fe Sanz Teruel | Villafranco del Guadalquivir (Sevilla) |
| 127. | Francisco Sánchez Antón | Alicante |
| 128. | José Cintas Vaquero | Bellavista (Sevilla) |
| 129. | José Abeledo González | Bellavista (Sevilla) |
| 130. | Antonio Calvo Guillén | Callosa de Segura (Alicante) |
| 131. | Señora de Calvo | Callosa de Segura (Alicante) |
| 132. | Ernesto Roca Genesca | Terrassa (Barcelona) |
| 133. | Esperanto Grupo Moiá | Moiá (Barcelona) |
| 134. | Jaume Molera | Barcelona |
| 135. | Ramón Molera | Moiá (Barcelona) |
| 136. | Antonia Urgellés | Moiá (Barcelona) |
| 137. | Ramón Fernández Jurado | Castelldefels (Barcelona) |
| 138. | Pilar Gómez Casino | Castelldefels (Barcelona) |
| 139. | Marti Guerrero Coys | H. de Llobregat (Barcelona) |
| 140. | Rosalía Desirre Rahona | H. de Llobregat (Barcelona) |
| 141. | Julián L. Morales | Bilbao |
| 142. | Beline Giovenal | Lyon (Francia) |
| 143. | André Giovenal | Lyon (Francia) |
| 144. | María Vila Mas | Premia de Mar (Barcelona) |
| 145. | Llibert Puig Gandía | Sabadell (Barcelona0 |
| 146. | Carme Cánovas | Sabadell (Barcelona) |
| 147. | Pierre Sevilla | Gujan-Mestras (Francia) |
| 148. | Ivonne de Sevilla | Gujan-Mestras (Francia) |
| 149. | Kati Prat | Gujan-Mestras (Francia) |
| 150. | Karina Prat | Gujan-Mestras (Francia) |
| 151. | Augusto Casquero de la Cruz | Madrid |
| 152. | Madrida Esperanto Liceo | Madrid |
| 153. | Paqui Corrales Guerrero | Málaga |
| 154. | Julio Herrero Segura | Málaga |
| 155. | Ricardo Felipe Albert Reyna | Málaga |
| 156. | Cristina Tirado Narváez | Málaga |
| 157. | Rafael López Castilla | Málaga |
| 158. | María Dolores Gaspar Jiménez | Málaga |
| 159. | Fernando Prieto León | Málaga |
| 160. | Cristina Morales Sánchez | Málaga |
| 161. | María Carmen Beltrán Moreno | Málaga |
| 162. | Alberto Jesús Vargas Yañez | Málaga |
| 163. | Juan Rodríguez Gómez | Málaga |
| 164. | Leonor Bellod Castellón | Málaga |
| 165. | Maruja Montañés Campos | Málaga |

# ESPERANTO EN MALAGA

La unuaj esperantistoj en Hispanujo estis en Malaga kaj la jaron 1890-an, t.e. du jarojn post la apero de la dua libro de la lingvo internacia, S-ro José Rodríguez Huertas publikigis la unuan lernolibron por hispanoj, kaj du jarojn poste, li mem fondis la unuan Esperanto-Societon en Hispanujo.

La jaron 1907-an prezidas la Societon S-ro Lano, kaj de la postaj jaroj ni ne posedas informojn pri la esperantista aktiveco, ĝis 1959-a, kiam okazis en Málaga la 20-a Hispana Esperanto-Kongreso.

En BOLETIN nº 113 (Januaro-Februaro 1959) oni alvokas la gekongresontojn per la jenaj vortoj:

«La urbo estas mirinde bela: ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas tiaj, kiajn deziras la naturamantoj. La panoramo de la kastelo «Alcazaba» estas neforgesenda. La tuta ĉarmo de Andaluzio estas malfermita, same dum la irado, kiel dum la reveno: Sevilla, Cádiz, Córdoba, Granada, ... svingado de palmoj, gitaraj melodioj, sorĉaj, dancoj, dolĉe ebriigaj oraj vinoj...!

La somera varmo de la sudaj landoj estas tie mildigita de la marventeto, kiu daure blovetas kaj alportas la kareson de la Mediteranea susuro».

Prezidis la Organiza Komitato S-ro Dionisio Ric Sánchez, Prezidanto del «Círculo Mercantil» kaj kiel Sekretario funkciis nia samideano S-ro Eleuterio Moreno García, kiuj multe laboris por la sukceso de la Kongreso. La tiama redaktoro de BOLETIN S-ro Luis Hernández (la karmemora valencia samideano, jam forpasinta) en la numero de Boletin 117 (Septembro-Oktobro 1959-a) komencis tiel la raporto pri la Kongreso:

«Kiel brila sunradio, sur emajlo de la suda marbordo, brilis la «20-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO». Dinamike varia programo, dum la daŭro de kompleta semajno, donis al la partoprenantoj la impreson vivi en urbo de fantazio, kie la tempo sole validas por plezuro kaj amuzo. Kum tiu sama etoso de mirinda fabelo, en ekskursoj kaj vizitoj, la rava logo de Andaluzio estis konstanta aŭreolo pri la nacia hispana kunveno, tra la jubileo de la Zamenhof-Jaro».

En la solena inaŭguro de la Kongreso okazinta en la salono de la Urbodomo, la tiama urbestro S-ro Francisco García Grana diris i.a. «D-ro Zamenhof, per sia unua broŝuro, malfermis la vojon al plej delikata espero kaj fariĝis gvidanto de tiu ideo, kiun vi reprezentas cele al lingva unueco, por tutmonda komuneco».

Kaj la Provincestro de Málaga S-ro Antonio Rodríguez Acosta, emfazis la gravecon de Esperanto dirante: «Nobla tasko estas strebi al la homa interkompreno pere de via bela komuna lingvo, saturita de AMO kaj PACO, por malebligi la uzon de tiu alia terura lingvo, kiun parolas blekantaj kanonoj, kiel universalan lingvon de milito».

Dum la menciita Kongreso prelegis hispane D-ro Rafael Herrero, la tiama Prezidanto de H.E.F., kaj esperante D-ro M. Solá, ambaŭ bedaŭrinde jam ne plu inter ni, kaj estis salutata «kun granda simpatio la fondiĝo de la Junulara Sekcio, kies ĉeestanta gvidanto S-ro Salvador Aragay ricevas gratulon».

Nia nunjara Nacia Kongreso en Málaga devas respeguli la maturecon kaj gravecon de la hispana movado, daŭrigante la vojon de niaj meritplenaj antaŭuloj, al kiuj pere de ĉi tiuj linioj, ni omaĝas.

**H. E. F.**

UNIVERSALA LINGVO

IDIOMA UNIVERSAL

# ESPERANTO



## 42ª HISPANA KONGRESO

## MALAGA

16 - 21 JULIO 1982


CAM

CAJA DE AHORROS PROVINCIAL DE MALAGA

1100